

Popola Fronto

INFORMA BULTEND INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
 REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

Melankolio

Troas jam la fingroj de unu sola mano por kalkuli la prilaborantojn de nia entrepreno!

Kiam ni redaktis la unuajn numerojn, antaŭ dudek monatoj, la redakciejo ĉiuvespere ŝajnis abelujo. La diversaj k variaj manipuladoj okazis inter viglaj konversacioj de multaj laborantoj. Oni parolis pri herojaj epizodoj; oni sugestis projektojn; oni revis k songis pri grandaj planoj. Tiam, la tragedio ankoraŭ estis en sia romanika fazo; sub tia impresio, la laboro ne estis devo, sed iu supera plezuro, distro k ripozo.

Tamen, apud la redakcia tablego, la rapida evoluo de la lukto montris akute siajn rigidajn trajtojn. La kanajla Ne-Interveno transformis la perfidan ribelon en kruelan militon. Kontraŭ koalicio de la tuta faŝista mondo, la idealista gesto de la hispana popolo troviĝis en malfavoraj kondiĉoj. Ne sufiĉis jam la kurajo nek la entuziasmo de la unuaj milicianoj. Ne taŭgis la eluzitaj armiloj. Novaj organizaĵaj metodoj estis nepre necesaj. Tiel ekaperis la Popola Armeo, kun deviga soldatiĝo de ĉiuj viroj, laŭ vica kontingento. Iom post iom, apud la redakcia tablego, maldensiĝis la ĉeestantaro. Kun sama fido k sama emocio, sed kun alia multe pli serioza nuanco ol antaŭe, la konversacioj daŭris, la projektoj pompis k la revoj petolis, dum la manoj diligente faldis k faldis unu numeron post alia...

Sed nun, kun la lastaj kontingentoj foriris la lastaj rezervoj. En la vasta ĉambro de la redakciejo, kie sonis iam viglaj voĉoj; apud la sama tablego, kie multaj manoj iam prilaboris centmilojn da banderoloj, regas nun silento. Jes, regas silento ĉar por plenumi la taskon, pri kiu zorgis multaj, restas nur malmultaj, tiel malmultaj, ke troas la fingroj de unu mano por ilin kalkulasi. Ni laboras streĉe dum tuta vespero k parto de nokto. De tempo al tempo, ni rigardas unu la alian k eviti ni ne povas iun mildan melankolion, pensante pri la karaj foririntoj, kiuj jam deoras en tranĉeoj k dormas sub la ĉielo, defendante la liberecon k efektivigante per tio, eĉ pli konkrete ol ni mem, la sanktan promeson pri obstina ekzisto de sia eldona kreaĵo, por semi veron tra la mondo.

Inter la riĉa kvanto da korespondadoj de niaj eksterlandaj amikoj, venas ĉiutage leteroj el la frontoj. Pli aŭ malpli lerte; pli aŭ malpli korekte, ĉiuj sopiras avide pri la samo: venki unue en la milito k reveni tuj poste denove apud la redakcia tablego, por prizorgi la gazeton, ne jam kiel bultenon pri milito, sed kiel heroldon pri serena paco ornamita per la verda stelo de la esperantismo. Tiaj deziroj fariĝos materio por la sinteno de tiuj mobilizitaj redaktoroj, kiuj aplikis al la formo de siaj vortoj la ekzemplon de siaj agoj. Honore al ili, pensante pri tio, por alproksimigi tiun tagon, laboras febre, preskaŭ senspire, tiuj, kiuj restis, tiel malmultenombraj, ke troas la fingroj de unu sola mano por ilin plene kalkulasi...

POR AŬTENTIKA DEMOKRATA RESPUBLIKO!

La terura milito, kiun Hispanio eltenas jam preskaŭ du jarojn, estis fonto por tre valoraj instruoj. Prudenta sperto ĉesigis la ludojn pri demagogaj aventuroj. La monopolemaj radikalismoj de partioj aŭ sindikatoj cedas lokon al komuna antifaŝista harmonio. Nenia hegemonio; nenia absolutismo pri anarkismo, marksismo aŭ respublikanismo! La pezo de la realo estas pli konvinkiga ol multaj argumentoj. La nuna Registaro reprezentas la kunfandiĝon, sub komuna celo k bezono, de plej variaj opinioj k tendencoj antifaŝistaj. Kaj tiu Registaro, kun la plena aŭtoritato de sia konsisto, prezentis dignan deklaracion pri la celoj de nia batalo. Tiu ĉi skemo, kiel fundamento de la postmilita Respubliko, koincidas kun la psikologio k ekonomiaj kondiĉoj de Hispanio k donas unuaniman respondon al tiklaj demandoj.

Granda malhelpo en la lukto estis la konfuza vento, kiu blovis eksterlande pri la karaktero de nia milito. Ni estu sinceraj dirante, ke eĉ fidindaj internaciaj amikoj falis en la kaptilojn de tre malice aranĝita propagando. La faŝistaj agentejoj uzis diversajn rimedojn por disvastigi du falsajn, kvankam tute malsamajn, informojn pri la hispanaj okazintaĵoj: Oni alarmis, en moderaj liberalaj medioj, pri radikala socia revolucio turmentanta burĝojn, ekzekutanta pastrojn k profananta monaĥinojn. Samtempe, oni «avertis», en proletaj klasbatalaj rondoj, pri la senkoloreco de nia situacio, k eĉ pri reakcia Registaro ĵongle kaptinta la regpovon por ekpersekuti k murdi la verajn revoluciulojn. Bedaŭrinde, ambaŭ friponaj metodoj trafis siajn celojn ĉar, pro timo, vastega etburĝa opinio fariĝis indiferenta aŭ heziteme aliĝis al la flanko de Franko, dum necedemaj klasbatalantoj, pro eraro, agitis kontraŭ la «demokrata teroro» helpante senscie la premon de la faŝistoj. Okazis ja la stranga paradokso, ke por unu komuna afero, oni rifuzis apogon, ĉu pro manko ĉu pro troo da revolucia dozo, laŭ gusto de apartaj palatoj...

Oportune estas nun, kiam la unueco estas jam fakto, fari konfesojn pri la danĝero je grandaj internaj kvereloj se la venko estus veninta frue, en la unuaj monatoj post la ribelo. Eble, iu tro facila triumfo estus deklivo, kie la vera revolucia impeto riskus glitfali senprofite. Tiukaze, rapide venkita reakcio estus definitive venkonta hidro, post efemera sukceso de nematura Popolfronto. Ĉiu aparta frakcio estus pretendinta trudi siajn dogmojn k siajn fanatikecojn. Amaraj epizodoj, feliĉe jam forpasintaj, atestas pri la vero de niaj puraj skrupuloj. La danĝero utilis do por masoni la unuecon!

Nur tra la kalvario de suferoj k doloroj, ni forĵetis la rutinojn de la ideoj k mezuris la dimensiojn de niaj ĝustaj kapabloj. Nia spirito hardiĝas en la batalo, dum plej diversaj programoj fluas tra sama kanalo, por sama fekunda celo. Oni komprenas, sen argumentado, ke iu nefleksebla politika metodo ne taŭgas por ĉiuj landoj, nek por ĉiuj momentoj. La lernado estis, k estas ankoraŭ, treege dolora, sed, laŭ sama proporcio, utila k instrua.

Sen vualoj nek sekretaj intencoj, ĉiuj partioj k sindikataj organizoj parolis, per buŝo de la Registaro, por diri, ke oni luktas unue por aseki la sendependecon de Hispanio k due por starigi Demokratian Respublikon laŭ novaj normoj starigitaj de la tuta popolo, per libera referendumo kun ĉiuj-specaj garantioj. Neniu tendenco rajtas pensi stampi sur la ŝtatan blazonon la signojn de sia privata emblemo! Jen do la resumo de niaj pretendoj:

Aŭtentika Demokratio estas necesa premiso por aseki la ekziston de ĉiuj opinioj, kiuj plene rajtos dece labori por konvinki la civitanojn pri la bono de sia doktrino k pri la kapablo k honesteco de siaj personoj. El tio oni deduktas, ke parolinte pri demokrata sistemo ne temas pri fino, sed nur pri komenco, en la vojo irenda, por la noblaj idealoj, kiuj devis sperti fortajn batojn por fari reciprokajn cedeojn sub la signo de l' antifaŝismo.

MOZAIKO

● La milita situacio estas nun pli stabila ol antaŭ unu monato. La facila antaŭeniro de la faŝistoj, dum unuaj tagoj de la ofensivo, estas nun haltigata; la pretendema celo kapti Valencion jam eble ŝajnos ĥimero al la ribelintoj. Potencaj fortikaĵoj estas konstruitaj, en konvena loko, k novaj grandaj kontingentoj da soldatoj ŝtopas la breĉojn. La atakoj en direkto al Barcelono estas absolute repuŝataj; en ĉiuj aliaj sektoroj okazas nenio rimarkinda.

● La proponon, pri tuja retiriĝo de la eksterlandaj batalantoj, oni rifuzis en la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj per kvar voĉoj kontraŭ du k naŭ sindetenoj, laŭ jena maniero:

Favoraj voĉoj: Sovetio k Hispanio.
Kontraŭaj voĉoj: Anglio, Francio,
Polio k Rumanio.

Sindetenoj: Ĉinio, Ekvatoro, Irano,
Belgio, Svedio, Bolivio,
Peruo, Zelandio, Latvio.

● La registaro de Meksikio neniel akceptas impertinentajn postulojn de anglaj kapitalistoj. Kiel sekvo de diplomata sintrudo, pri petrolaj aferoj, Meksikio rompis siajn diplomatajn rilatojn kun la registaro de Anglio.

● En Malago ĵus mortis la generalo Cabanellas, plej maljuna estro el la ribelinta bando. Ankaŭ, laŭ formalaj sciigoj, alia gvidanto, la generalo Yagüe, estas arestita pro publika parolado, kiun li faris laŭdante la kuraĝon de la respublikanaj soldatoj. La unua stoko da generaloj elĉerpiĝas...

● En la superaj instancoj de Usono kreskas la opinio favora al normala komerco pri armiloj kun la legitima registaro de la Hispana Respubliko. Kiel pioniro de tiu movado aperas la demokrata senatano Mye.

● La Banko de Hispanio publikigis sian bilancon, kio estis vera sensacio en la financaj medioj. La ciferoj montras, ke pli ol duono de la mono elspezita, por militaj aferoj, revenis al la ŝtata kaso, restante ankoraŭ sendifekta preskaŭ la tuta provizo da oro.

● Por dementi la falsajn asertojn pri kontraŭreligiaj persekutoj, la Registaro permesis al kelkaj pastroj celebri mesojn en Madrido, Barcelono k Valencio, kun rajto por aliaj urboj.

● Venis al Barcelono 840 tunoj da manĝaĵoj, kolektitaj de la Popola Helpe de Francio; la delegito de tiu institucio, sinjoro Pradines, deklaris, ke la franca popolo ĉiutage estas pli helpopreta por mildigi la dolorojn k suferojn de Hispanio.

● La Vatikano dementis la sciigon, el faŝista deveno, laŭ kiu oni volis kredigi, ke la Papo agnoskis jure la reĝimon de Franko. La noto diras, ke la papa delegito, ĉe la «naciista» zono ne posedas la kategorion de nuncio.

● En ĵusa artileria bombardado kontraŭ Madrido, kelkaj obusoj eksplodis, okaziginte viktimojn k damaĝojn, en la legacioj de Nederlando, Anglio, Ĉilio, Kubo k Polio. Eble tio celas gajni la simpatian de la koncernaj registaroj, kiuj tiel fervore ŝatas la elmontron de barbareco.

● La hispana poŝto anoncas la eldonon de serio da poŝtmarkoj por afranki la korespondadojn por submarina servo. La filatelistaj amatoroj certe akceptos kun plaĉo tiun ĉi novajon, kiu montras detalon pri artaj zorgoj eĉ en mezo de furioza milito.

● Ĉiuj volontuloj de la Internacia Brigado, kiuj kripliĝis dun la milito, ĵus ricevis permeson foriri al siaj hejmoj. Antaŭ ol la ekveturo, ili adreŝis kortuŝan leteron al la ĉefministro, doktoro Negrin, esprimante sian fidon por la Respubliko je kies defendo ili oferis parton el sia korpo.

● En la faŝista zono de Hispanio, laŭ freŝa dekreto, oni malpermesas abonon, ricevi k legi eksterlandajn ĵurnalojn, gazetojn, librojn k revuojn. Nur post rigora enketo, oni povas akiri tiun rajton se temas pri eldonaĵoj el pura faŝista ideologio.

ANTIFAŜISTA BONHUMORO

INTUICIA RESPONDO

Franko vizitis lernejon. Post kelkaj demandoj al la lernantoj, li sin turnis al unu infano, kiu aspektas lerta:

—Se vi estus mia filo, ĉu vi dezirus esti muzikisto?

—Ne, sinjoro ĉefgeneralo — respondis la demandito.

—Ĉu eble, al vi plaĉas pli esti komercisto?

—Ankaŭ ne — denove diris la knabo.

—Ŝajne, vi preferas esti bankiero aŭ militisto, ĉu ne?

—Ho, neniel — triafoje ripetis la lernanto.

—Ĉu vi do preferas nenion? — demandis la ĉefgeneralo rigardante la infanon kun miro.

—Se mi estus via filo, mi ja volus esti... orfo! — respondis rapide la sprita knabeto.

TERURA STATISTIKO

Jen la terura statistiko pri la infanoj mortigitaj k murditaj de la faŝistaj aviadiloj en Hispanio, de Julio 1936. ĝis Marto 1938.

	Mortintoj	Vunditoj
Madrido (urbo)	879	1.580
Barcelono (urbo)	598	1.010
Valencio	529	416
Asturio	1.214	2.000
Baskio	694	1.165
Madrido k Gvadalaĵaro	1.579	2.649
Santander	1.247	1.899
Jaen	211	555
Centraj provincoj	2.011	1.974
Katalunio (sen Barcelono)	1.647	2.472
SUME	10.709	15.320

Tiu ĉi tragika listo kalkulas do 26.000 infanajn viktimojn. Tamen, la realo estas multe pli terura. Oni ne kalkulis la mortintajn infanojn en kelkaj orientaj k sudaj provincoj. En Malago mem, ĝis Februaro 1937, falis kelkaj centoj. Pri la pasinta Aprilo ankoraŭ oni ne faris statistikojn. Certe, jam pli ol 50.000 hispanaj buboj mortis aŭ kripliĝis pro la aeraj murdistoj laborantaj, pere de Franko, je la servo de Hitler k Mussolini.

Pli ol 50 000!... Tamen, ĉu la cifero estas granda apud la impona kvanto da infanoj kondamnataj, de la milito, al la orfeco, mizerulo k senhejmeco? «Ha! — eble diros la simpatiantoj por la sciencaj murdistoj — Tio ja estas natura sekvo de ĉiu milito».

Bedaŭrinde, ekzistas tiaj personoj; sed ili morale ne rajtas naskigi filojn, kiel ankaŭ ili ne meritis siatempe havi patrinon!

LA BONAJ AMIKOJ ESTAS MULTE PLI NECESAJ DUM LA MALFACILAJ HOROJ

Eble la blufa faŝista propagando, pri nia baldaŭa pereco, trafis la spiritostaton de niaj legantoj ĉar la lastaj raportoj de niaj financaj perantoj prezentas senteban malaltigon de la mondonacoj. La monata, anstataŭ duonmonata, apero de la gazeto neniel devas esti motivo por malvarmigi la subtenemon de la amika esperantistaro. Kruelej motivoj devigis nin fari tion, sed oni devas scii, ke ne pro tio la elspezoj reduktiĝas. Nuntempe unu numero preskaŭ kostas la saman monon ol du numeroj en la komenco de ĉi tiu jaro. Ni bezonas, pli ol ĉiam, la plivigliĝon de nia municio, ĉar la bonaj amikoj estas necesaj dum la malfacilaj horoj, k certe ne ĉiuj legantoj konscias k scias pri la ega fortostreĉo, kiun ni devas fari por ne perdi la kontakton kun tiuj nekonataj konatoj internaciaj al kiuj, jam preskaŭ du jarojn, ni konfesas niajn angorojn k laŭtigas niajn revojn. Multe pli facila estas la tasko oferi monerecon ol bezoni ĝin por oferi la ripozon k la sanon. Kaj per tio ni masonas neskieblan fundamenton por eldoni siatempe — baldaŭ! — la gazeton en multe pli da paĝoj, eĉ en pli arta bela aspekto, ol ĝis nun gi aperis, dank' al ĉiuj amikoj, kiuj elpruvus esti bonaj dum la horoj malfacilaj...

PERDITAJ INTER FAŝISTOJ

Tra la mallumeco de plua nokto, sonas voĉo de antaŭenlokita deĵoranto, kiu, ekaŭdinte paŝojn, demandas: —Haltul! Kiu staras tie?— ĉesas la paŝoj; oni aŭdas tamen murmurojn. Komencas tuj stranga konversacio:

—Haltul!—ripetas la deĵoranto—kiu staras tie?

—Atentul! Aŭdu, ne pafu!—respondas iu, je kvardek metroj. —Ĉu vi apartenas al tiuj de «Supren Hispanio»?

—Nel mi estas C. N. T.-ano k soldato de la Respubliko! Respondu rapide, kiaj vi estas; se ne, mi pafos!

—Aŭdu, ne pafu! Mi venas kun pluraj kamaradoj. Ni serĉas la soldatojn de nia bataliono, ĉar ni ĉiuj devojiĝis dum la lastaj bataloj. Ni ne portas armilojn. Tial, ke mi tute ne scias al kia flanko vi apartenas, mi mem proksimiĝos al vi. Vidu! Mi marŝos klaklante por eviti dubojn pri mia senarmeco. Ĉu?

Eksonis tiam ritmaj klakoj k samtempe firmaj paŝoj proksimiĝantaj sur la ŝtonoj. La deĵoranto preparis pafilon; post kelkaj minutoj, li distingis manojn klaklantajn k vizaĝon de venanto. Li mallevis la pafilon. Kiam la vizitanto estis proksime, subite li ekprenis pistolon, kiu pendis per rimeneto el lia maniko, k senarmiginte pro surprizo la deĵoranton, li flustris kolere:

—Perfidulo! Vi ne estas respublikana soldato, sed faŝisto. Nun mem vi nepre mortos...

—Ne; ne, kamarado! Mi estas lojala soldato k eĉ antikva milicano. Venu kun mi al proksima tranĉeo k vi konstatos tion. Ni irul —Bone, ni ekiru; sed vi marŝu antaŭ mi. Zorgu ne kuri nek krii nek fari bruon! Memoru, ke mi portas vian fusilon k mian pistolon...

Baldaŭ ĉio klariĝis. Apud fajro, post frataj premoj, per manoj k brakoj, en la tranĉeo oni kunvenis k interparolis. La tranĉeoj vigle akceptis la restintajn kamaradojn, kiuj tuj alkuris tien, kiam ili aŭdis la gajajn voĉojn, per kiuj estis salutata la unua sendito.

En la Divizia Stabo, post manĝado k trinkado, ili rakontis siajn aventurojn. Unue parolis la klakinto. Li estas kapitano; la aliaj dividiĝis je unu komisaro, tri kaporaloj k du soldatoj. Ilia roto restis izolita, pro daŭra batalo; la malamiko antaŭenmarŝis. Subite, la roto troviĝis malantaŭ la fronto, interne de faŝista teritorio. Tiam, li—malnova batalanto en Santander—kunvenigis ĉiujn rotanojn k donis ordonojn: ĉiuj devas fordemeti la insignojn; la pafilojn estu ŝetataj en riveron, senigitaj de iliaj plej gravaj pecoj; la mitraliloj restu kaŝitaj en la supro de alta monto, kien eble nur la kaprinoj supreniros; la manbombojn k pistolojn zorge konservu ĉiuj. Poste, kun frataj salutoj, la roto disiĝis en grupetojn, kiuj foriris laŭ diversaj direktoj.

La grupo, gvidita de la kapitano, post dekdu-taga marŝado, tra malamika tereno, manĝante glanojn k karobojn, kaŝante sin ĉiam, sukcesis plene; trapaŝante silente dumnokte tra la trupaj tendaroj; respondante nenion al vokoj de la deĵorantoj, forkurante de la pafoj k tolerante la pluvon, ĉiam pretaj sin defendi per manbomboj. Oni povas imagi do ilian ĝojon ripozi jam apud bonaj samcelanoj. Ankoraŭ ili rakontis multajn aliajn epizodojn. Nun mi ne volas plilongigi la priskribon. Eble, en venonta artikolo, mi rakontas ion alian pli.

Salvador DASI

Staba leŭtenanto

Orienta Fronto, 5. Majo 1938.

Scienca Gazeto

OFICIALA ORGANO DE AMERIKA ASOCIO POR INTERNACIA SCIENCO KAJ ETNOGRAFIA KAJ LINGVISTIKA FAKOJ DE AMERIKA ESPERANTO-INSTITUTO

Popolscienca revuo kun diversa enhavo. Dumonata, 24-paĝa, ilustrita. Facile legebla, eĉ por komencantoj.



Petu tuj senpagan specimenon. Adreso:
AMERIKA ESPERANTO-INSTITUTO
ROCKFORD, ILLINOIS, USONO

Komentoj al malamika libro

Paĝoj 34-35 el la verko «Spanische Silhouetten» (Hispanaj Siluetoj), de Edwin Erich Dwinger. Eldonejo: Eugen Diederichs, Verlag, Jena (1937). Sudetgermana amiko el Ĉeĥoslovakio sendas al ni jenajn komentojn por publikigo.

«En la fosotruo de la serĝento kuŝis matraco; sur ĝin ni sidigis en miksita vico. Iu maŭro regalas nin ĉiam denove per teo; dume aliaj seninterrompe devigis nin manĝi. Ne estas ĉina teo, kion la araboj trinkas; tio estas nur tute simpla pipra teo, kiun ili preparis tiel specialmaniere, ke ĝi bonege gustumis al mi, verŝajne ĝi estis krome forte dolĉigita per mielo. Tial ni ensorbis unu glason post la alia. Hispana serĝento dediĉis al tio botelon da brando ŝtele akiritan. La nokto senteble iom post iom malvarmiĝis, k ambaŭ trinkaĵoj trafluus vivige niajn korpojn. Daŭre oni proponis al ni cigaredojn, tiajn specialajn hispanajn cigaredojn manrolitajn, kiuj enhavas tre bonan sed ankaŭ, senmezure, fortan tabakon. Cetere, oni multe rakontis, per plastiko de substrekanĝaj gestoj, kiuj ankaŭ la plej fremdan vorton al ni komprenigis, pri la hodiaŭa ŝtormatako.

Mi subite komprenis, sen plua klarigo, kial la «ruĝuloj» ne povas kontraŭstari al la maŭroj; mi komprenis ĝin antaŭ ĉio, kiam ili al mi prezentis sian batalkion. «Tiel ni fari» (*), diris maljuna Rif-kabilano, montrante siajn dentojn grimace: *Allaallaallaalla*. Ĝi sonis efektive tiel, ke frostotremo vibrigis niajn dorsojn, sed, malgraŭ tia terurigaĵo, ankaŭ estis ĉe la maŭroj io infaneca, se ili ekzemple, knabece k gaje, montris al ni siajn horloĝojn, kvazaŭ bonmeritatan salajron, forprenitajn al tiu aŭ tiu ĉi kadavro. Por malmultekosta vekhorloĝo, ili donis tri valorajn poŝhorloĝojn.»

Tiel simile temas la menciita libro, kiu pruvas dokumente ke la enhavo de POPOLA FRONTO estas vera. Dwinger estis, kiam junulo, militkaptita en Rusio k verkis du bonegajn librojn pri la tiea sufero de la kaptitoj. Unu nomiĝas «La Armeo post pikdratbarilo» k la alia «Inter Blanko k Ruĝo». Kiel oficiro de la Koltschak-blankuloj, li skribis interalie en la lasta libro «...kie ni, blankuloj, estis restintaj, la vilaĝanoj akceptis la ruĝulojn malfermitbrake, ĉar ili nur prenis la necesan, sed ni prenis ĉion k krome detruis ĉion...» Tiel verkis Dwinger, kiam li ankoraŭ ne estis prostituito de Franko k esprimis sian propran opinion. En «Hispanaj Siluetoj», li entuziasmiĝas pri la araboj k fantazias pri fabeloj de «Mil k unu noktoj» forgesante, ke tian fabelon ankaŭ ĝuis la germanaj Rejnlandanoj post la milito. Tiam ni, germanoj, ankoraŭ ne havis la malsanan fantazion de Dwinger k suferis sub la «nigra honto».

Depost kiam, aŭskultu vi, sinjoro Dwinger! oni nomas la ŝteladon al la mortintaj soldatoj, *bonmeritata salajro*? Germanoj malestimas tion el fundo de l' koro k nomas tiajn homojn: «hienoj de la batalkampoj» k tial ankaŭ malestimas vin, gloranton de tiu ĉi krimo. Iam, kiam vi ankoraŭ ne estis subaĉetita de certa reĝimo, vi verkis bonajn librojn, sed nun vi verkas laŭ ordono k favora vento. Germano, kiu ne estas ruĝulo nek bolŝevisto, laŭtvoĉe kondamnas vin k li, per tio, iomete volas regajni la estimon de la hispana popolo por la germana, de tiu popolo, kiu ne embuske atakis nin, restinte neŭtrala dum la mondmilito.

(*) Maŭra jargona parolmaniero, kiu signifas: «Tiamaniere ni kriis».

MEMORE AL LA PIONIROJ DE LA ĈINA REVOLUCIO

Kun ioma prokrasto, ni aperigas ĉi-sube la raporton, kiun sisteme ni ricevis de esperantista agentejo el Kantono. Ni resume mallongigis la raporton, kiu malgraŭ tio klarigas kelkajn komencajn aspektojn pri la nuna situacio en la Ekstrema Oriento.

La nacia revolucio de Ĉinio, sub la gvidado de D-ro Sun Jatsen, havas du gravajn taskojn plenumendajn, inter kiuj la unua estas nuligi la enlandan feŭdalismon, k la dua eviti la eksteran imperialismon. La unuaj sukcesoj estas evidentaj per la renverso de la Manĉu-Dinastio. Pri tiu okazintaĵo, hodiaŭ ni rememoras la gloran morton de 72 martiroj, kies oferemo, kune kun tiu de multaj miloj da ĉinaj patriotoj, reprezentas nur unu el la diversaj furiozaj bataloj kontraŭ la feŭdalismon. Kvankam la Manĉu-Dinastio, jam estas faligita, estas ankoraŭ oportune, pro la japana invado, memori pri la heroo agado de la 72 martiroj:

Por renversi la putran dinastion, doktoro Sun Jatsen starigis sian stabon en Hong-Kong, dum la 1911-jaro. Oni decidis ribelon en Kantono por la 15. de Marto tiujare. Oni prokrastigis la planon ĝis la 28. pro tio, ke la militleĝo estis proklamita en Kantono, de post la fiaskinta atenco de la revoluciulo Uin Cajsens kontraŭ Fu Ĉi, grava generalo. La agentoj starigitaj en Kantono por la revolucio estis 37, kiuj kun la junaj gekamaradoj, sub la gvidado de Hŭang Ŝing, preparis sin oferi. Oni agitis pri partopreno en la revolucio al la tiama nova armeo (el trupoj kun modernaj ekipoj k materialo, sub rekta komando de la Manĉu-Registaro) krome, oni organizis la tiel nomatan «risiko-al-morto» grupon inter la plej fervoraj partianoj. Sed, bedaŭrinde, la sekreta monokolektado por la revolucia servo estis malkovrita de la ŝtataj spiono. La kantona Registaro aktive gardis sin kontraŭ la subtera movado de la revolucia partio. Oni komencis traserĉojn de domo al domo; la municion de la revoluciuloj oni konfiskis k oni tuj senarmigis la suspektindajn soldatojn el la nova armeo. Spite ĉion, Hŭang Ŝing k liaj kamaradoj ankoraŭ persistis okazigi



La skoltaro de Kantono solene partoprenas en la ceremonio

la Revolucion laŭ fiksita dato, nur kun iomete da ŝanĝo en la originala plano. Post flama parolado de Hŭang Ŝing al siaj kamaradoj, je la 4.^a matene de la 29. de Marto 1911, ili ĉiuj plenstreĉe leviĝis por plenumi la sanktan taskon. Antaŭ krepusko, Hŭang Ŝing gvidante siajn amikojn sieĝis la ĉefoficejon de la Registaro. Survoje ili venkis la gardistojn k penetris internen. Tamen post serĉado, oni trovis nenium, ĉar ja ĉiuj oficistoj fuĝis, informitaj pri la celo de la partianoj. Kiam la revoluciuloj marŝis al la Orienta Pordego de Kantono, ili renkontis la ŝtatajn trupojn sub la gvido de generalo Li Ĝuen. Tuj okazis furioza stratluktado mortinte multaj revoluciuloj. Hŭang Ŝing, iomete vundita, sukcesis forkuri. Multaj aliaj estis arestitaj k kondamnitaj al morto senescepte. La nombro da partianoj, kiuj perdis la vivon atingis la ciferon 72 k pro tio omaĝe oni nomas ilin la 72 martirojn. Jen estas la skizo pri la revolucia historio, kiu antaŭiris la naskiĝon de la Respubliko. La spirito de patriotismo k humaneco de tiuj martiroj estas rememorable k estimataj de ĉiuj gefiloj de Ĉinio precipe nun, dum la epokfaranta lukto kontraŭ la japanaj invadintoj.

Ĉiujare, kiam la memortago venas, ni, ĉinoj, ceremonie omaĝas la 72 heroojn. Ĉi-jare, dum la rezistada batalado, eksterordinare, ni festis la datrevenon. Memorante pri ili, ni salutas tutkore ĉiujn falintojn serve al la Mondpaco. En Kantono okazis grandioza ceremonio; centoj da miloj da civitanoj iris al la Tombejo de la Martiroj por ilin honoru. Vespere okazis parado kun torĉoj k belaj kantoj; ankaŭ oni prezentis dramon pri la historia festo. En tiu ĉi tago ni vidas jam la realecon de nia senmorta revolucio k la varmajn aspirojn de la ĉina popolo batalante kuraĝe k vigle, sen ripozo, kontraŭ la ungoj de japana imperialismo!

HISTORIA DEKLARACIO DE LA HISPANA REGISTARO

Por klarigi la verajn taskojn de nia Respubliko, post la milito; la Registaro, kiu konsistas el reprezentantoj de ĉiuj antifaŝistaj tendencoj, sen ia escepto, publikigis deklaron, kiu meritas nomon de grava historia dokumento. Ni resumas k prezentas ĝin traduke al nia legantaro por kompreno de nia batalo, sub oficiala vidpunkto.

«La unueca Registaro de la Respubliko, kun plena konsento de ĉiuj partioj k sindikatoj de Hispanio, reprezentante ĉiujn civitanojn en la lojala zono, deklaras solene antaŭ la mondo, ke siaj celoj en la nuna milito estas jenaj:

1e. Asekuri la sendependecon de Hispanio, liberigonte ĝin je ĉiu ajn fremda sintrodo, kvankam dezirante amikajn rilatojn kun ĉiuj aliaj popoloj de la mondo.

2e. Forpeli el la nacia teritorio ĉiujn eks-

terlandajn trupojn, kiuj, sub diversaj teknikaj pretekstoj, invadas la landon.

3e. Starigi Popolan Respublikon, sub principoj de pura demokratio, kun digna Registaro, kies aŭtoritato kuŝos sur la libera volo de la tuta popolo per universala sekreta balotado.

4e. Arangi referendumon, tuj post la milito, kun plena garantio por ĉiuj opinioj k tendencoj, por strukturi la novajn sociajn ŝtatajn k jurajn normojn.

5e. Respekti la regionajn liberecojn, sen malzorgo pri la tutlanda nacia unueco.

6e. Agnoski plenrajtecon de ĉiu civitano en politika, socia k religia praktikoj.

7e. Gardi la legitiman proprajn, evitante samtempe la akumuladon de troaj riĉaĵoj k protektante la rajtojn de la laboristoj.

8e. Likvidi la restintan feŭdalismon per

decida agrara sistemo, kiel oportuna bazo por sana kampana demokratio.

9e. Garantii la konkeraĵojn de la laboristaro per antaŭtenema socia leĝaro.

10e. Zorgi akurate pri la ĝenerala plibonigo de la homa raso en ĝia fizika kultura k morala aspektoj.

11e. Konservu la nacian armeon ekster la influo de ĉiu partio aŭ tendenco, kiel instrumenton, por defendi la liberecon k sendependecon.

12e. Rezigni, laŭ konstitucia postulo, pri militaj atakemaj agoj, obeante fidele traktatojn k akordojn en la internacia koncerto.

13e. Apliki vastan amnestion por ĉiuj hispanoj, kiuj deziras kunlabori en la rekonstruado de Hispanio, evitante ĉiun senton de vengo k revengo pro la nobla tasko, kiun per ofero k laboro oni devos plenumi.»

LA NEGUSO EN ĜENEVO

Anekdotoj pri aperaĵuloj svarmas tra la Historio ekde la tago, kiam Belŝacaro, en diboĉa festeno, legis la fatalan verdikton, kiun skribis por li, sur muro, iu mano mistera. Obsiine rajdante sur ili, ĉiu aperaĵulo maltrankviligas friponajn konsciencojn. Super la impona pavilono de la Ligo de Nacioj ĵus ŝvebis la ombro de la eksa imperiestro de Abisenio. Ĝi aperis kiel vizio el konfuzaj signoj: rabena barbeo, speciala ombrelo kiel tre eta mantelo skizis la figuron de malalta homo. Kvankam oni prave dubas, ĉu la diplomatoj sentas emocion antaŭ aperaĵuloj—ĉar por tio necesas posedi konsciencan tamen, la digna ĉeesto de l' Neguso ŝiris la falsan famon je seriozeco al tiu perfidema tribunalo de Ĝenevo. Malpeza ombro de fantomo estis pli forta ol la mensogoj de sofismoj, kiujn la «juĝantoj» knedis por kaŝi sian aliancon kun la punendaj juĝatoj. La luksa kaverno internacia de la modernaj rabistoj transformiĝis en templon, kiam, inter plektaĵoj de biblia barbeo, malforta voĉeto parolis admone: «Mi akuzas...» Kaj vere ĝi akuzis la profanantojn de pacaj popoloj. Ĝi akuzis tiujn, kiuj, anstataŭ eviti, toleras la murdojn. Ĝi akuzis ankaŭ ĉiujn, kiuj, kun ŝajno de honesteco, komercas je la rabaĵoj. Ĝi akuzis finfine, antaŭ la tuta mondo, pri la monŝira legitimacio de elpruvita krimo. Kaj hodiaŭ, kiam la justeco mizeras ĉe la klingo de la glavoj, kiam la rajto ne plu valoras, la melankolia ombro de la vaganta Neguso estas resumo, plej kompleta, pri la nuntempa politiko internacia.

Ni nin defendas sen permeso!

Por paroli pri la lasta kunveno de la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj estas necese tukumi la nazon por ne flari miasmojn. La faŝista triangulo Berlino-Romo-Tokio triumfis en Ĝenevo, ekstere de Ĝenevo mem. Publike, cinike kiel rikane la eŭropa demokratio, fuŝe reprezentata de Halifax kiel Bonnet, rifuzante la proponon de la hispana ministro Alvarez del Vayo, aprobis kiel instigis la intervenon de la internacia faŝismo por sklavigi la hispanojn.

La propono de nia delegito estis simpla kiel prudenta: Foririgi la cent mil eksterlandanojn el la armeo de Franko kune kun la ses mil internacianoj el niaj brigadoj! Kaj okaze de ties neefektiviĝo, rapida kiel tuja likvido de la Ne-Interveno. Neniu objektiva cerbo konsideros pretendema la postulon de nia popolo, kiu jam preskaŭ du jarojn defendas izolate sian liberecon kiel elementajn normojn de civitana etiko. La faŝista ideologio sukcesis inokuli sian venenon, en la korpon de la Ligo de Nacioj, pere de la reprezentantoj de la plej antikvaj demokratioj. Pro tio, la Ligo nur estas nun ia kadavro, kiun urĝe oni devas entombigi. La mondo revenas denove al malnovaj aliancoj inter kapitalistaj grupoj, en potencaj monopoloj kiel trustoj, defendante aparte ĉiu el ili siajn proprajn interesojn, por kiuj la milito estas natura atmosfero.

La oficiala rifuzo al nia propono ne estas malvenko por Hispanio, sed definitiva fiasko por la Ligo de Nacioj, burokrata institucio, kiu jam delonge pruvis sian netaŭgecon por gardi la pacon kiel protekti la malfortajn naciojn je la atakoj de rabemaj ŝtatoj. Hispanio iomete fieras nun, ke ĝia obstina rezistado ebligis finfine forĵeti la maskojn de tiuj kaŝaj helpantoj de l' faŝismo, kiuj tamen volis aperi kiel adeptoj de la demokratio. La propra civitanaro de Anglio kiel Francio ne bezonas nian konsilon por agi konsekvence; sed almenaŭ nia ekzemplo povas iel taŭgi por agi fundamente. Intertempe, ni batalas; suferas kiel mortas. Ni batalas kiel ne kapitulacias. Ni suferas kiel ne plendas. Ni mortas kiel ne malaperas, ĉar praktika instinkto gvidis la hispanojn tra la ĝusta vojo. Ĝenevo nur estas por ni publika tribunalo pri vivosigno. Ni ne malŝatas—sed dankas tre kore!—la helpon de aliaj popoloj, sed ankaŭ ne malfortiĝas nia fido pro la friponeco de aliaj registaroj. Ni konscias pri nia kapablo. Oni mezuris jam la egan kvanton da fervoro, oferemo kiel heroeco de nia popolo, militante por defendi siajn rajtojn kiel siajn arogajn volojn.

Ni solaj organizis nian kontraŭstaron al la plej fortegaj puŝoj de la reakcio. Ni solaj certe transformos la reziston en atakon por atingi definitivajn celojn. Ni neniel—neniel!—volas doni al sinjoro Halifax la ŝancon paroli pri humila submetiĝo de la hispana popolo, kvazaŭ pri efektivigita fakto...

Ni nin defendas jam—ĉu vi scias tion?—sen permeso de filistoj!

NIA POŝTO

Al la redakcio venis jena letero, kiun ni tre plaĉe reproduktas:

Madrido 12. Majo 1938.

Al la Direktoro de POPOLA FRONTO

Kara kamarado!

Kun granda ĝojo, mi legas, ekde la komenco, vian ŝatatan gazeton, kiu fidele respegulas la veron pri diversaj kialoj de la defenda batalo, kiun ni eltenas por la libero, la demokratio kiel la homaj rajtoj. Ankaŭ via revuo faras, laŭ mia opinio, bonegan servon al Esperanto mem, ĉar ĝi montras al skeptikuloj, ke ĝi praktike taŭgas por sciigi malsamlingvanojn pri konkretaj aferoj, sen neceso eldoni plurlingvajn multekostajn informilojn.

Krom tio, mi konsideras ĝin kiel altvaloran interrilatigilon por ĉiutendencaj esperantistoj. Ĝiaj artikoloj estas sufiĉe objektivaj kiel utilaj por komprenigi ĉiujn esperantistojn, ke sincera kunlaboro estas ebla. Kompreneble, mi ja scias, ke kunfandiĝo de ĉiuj Esperanto-organizoj, en unu solan, estas utopio krom eraro. Necesas, ke ĉiu esperantisto laboru, en sia aparta medio, por Esperanto, kun rajto—ankaŭ interne de la revlando Esperantio—por konvinki aliajn samlingvanojn pri la bono kiel pravo de siaj apartaj ideoj, ĉu politikaj, ĉu religiaj, ĉu filozofiaj aŭ alispecaj. Tial, paroli—tro absolute aŭ tro mistike—pri ideala kunfandiĝo de la tuta esperantistaro estas revo neniel plenumota.

Tamen, estas fakto ke ni ĉiuj konsistigas reale iun tutaron, kies nomo estas Esperantio aŭ Esperantujo (ni ne kverelu pro unu litero pli aŭ malpli!) Nu, mi pensas, sekve, ke kvankam ĉiu el ni jam havas sian propran opinion, kiel oni ne povas eviti diskutojn—kio, cetere, ne estas rekomendinda, ĉar diskuto estas signo de vivo—almenaŭ, ni povus provi enkonduki, en nian idealan regnon, tiun prudentan toleremon, kiun ĝuas kelkaj saĝaj personoj respektemaj por alies (aŭ de iu alia, perdonu la neadeptoj de tiu formo) opinioj. Estus bone, ke inter ni, ĉiam ni alparolus unu la alian sen atakoj, sen insultoj nek mensogoj, sed male, kun tia perfekta edukiteco, kun tia ĝentilo, ke la karakteriza eco de ĉiu esperantisto—krom tiu de komuna posedo de sama lingvo—estus ĉie ajn ia afabla toleremo. Mi do ne petas multon!

Kiel jam dirite, mi ne celas al ŝablona kiel blinda akcepto de iu kredo, sed ni uzu racion kiel avantaĝojn de la internacia lingvo por instrui kiel lerni per serena diskutado. Esperanto, per tio, certe gajnos multon!

Tolereme via

A. BAKE

Se mankas la oficiala favoro de la registaroj, ekzistas la varma fervoro de ties popoloj!

POPOLFRONTA LETERUJO

Boucon.—Annecy.—Multan dankon pro via poŝtkarto, kiun ni atente legis. Kun granda plezuro ni diskutis pri lingvaj aferoj, tiel kun vi kiel kun aliaj kamaradoj, kiuj sin turnis al ni pri sama temo. Sed... komprenu, ke nuntempe, por ni estas neeble okupiĝi pri allogaj aferoj, kiujn ni estas devigataj forlasi por pli urgaj taskoj. Espereble, iam ni povos tuŝi tiajn temojn, kion ni faros plezure.

H. Nilsson.—Malmö.—Dankon pro viaj klopodoj! Al la menciitaj k-doĵ ni sendas la gazeton. Antaŭen!

H. Ericsson.—Sundsvall.—Viajn leterojn k gazetojn ni ricevis, k pri viaj petoj ni klopodos komplezi vin laŭeble.

Koran dankon pro via laboro!

Mercier.—Lagny.—Ricevinte vian leteron ni sendas al vi nian gazeton k penos kontentigi vin en via deziro. Momente ni ne konas kamarad (in) ojn pretaj korespondadi kun vi, sed se vi konsentas ni publikigos anoncon, kiu certe utilos.

B. G.—Gablonz.—Vian artikolon ni volonte publikigas k la enhavon de via afabla letero ni notas. K-do J. Bosch estas nun tre okupata, sed malgraŭ ĉio li respondos vin.

Juncadella.—Figueras.—Ni transsendis al vi ĉiujn leterojn por vi alvenintajn. Bonfartu!

Anton.—Fronto.—Ni notas vian novan adreson k ĝojas esti ricevintaj viajn sciigojn.

J. Elias.—Lens.—Dankon pro la ricevita gazeto «Dissemantino» kun traduko el nia bulteno. Daŭrigu la taskon!

N. K. Helsinki.—Vian PK ni ricevis, k publikigas la anoncon. La ceteron ni bone notas. Ni jam skribos al vi.

V. Gruŝinskij.—Nikolaev.—Dankon pro via letero. La anonco estas publikigata k ni akceptos Esperanto-librojn plezure.

C. K.—Naaldwijk, kaj P. K. O.—Paisley.—Ni ricevis viajn gazetojn, enhavantaj tradukaĵojn k favorajn citaĵojn.

Koran dankon. Fratan manpremon!

Al kelkaj.—Ne forgesu sendi al ni la koncernajn gazetojn, kiuj enhavas tradukaĵojn el nia gazeto. Tio ne estas malgrava.

KORESPONDADO

Simpla trilingva anonceto 4 f. fr.

SVEDIO.—Por Esperanto-kolono en sveda komunista gazeto, la subskribanto dez. leterojn kun antifaŝisma enhavo el gekdoj en la tuta mondo. Volonte ankaŭ PEK-bult. k. a. gaz. Mi sendos gaz. kun publikigita materialo. Antaŭdankon! Sendu ĉion al k-do Jim Rikard Hanson, Krokegatan 5, Goteborg, Svedio.

SOVETIO.—K-do Jurio Korotkov, str. Transportnaja 7.^a, Voroneĵ, dez. korespondi.

SOVETIO.—K-do V. Gruŝinskij, Plechanovstr. n.^o 36, Nikolaev, Sovet-Ukrainio, dez. kor. kun hispan (in) oĵ k antifaŝistoj el tutmondo. Interŝanĝas PM k PK.

NEDERLANDO.—K-do D. Ouwehand, Hoogetal 2, Den Haag, dez. kor. pri tre serioza temo kun esperantistoj el Belgio, Francio, Hispanio, Portugalio, k Afriko.

USONO.—K-do P. S. Thomas, 556 West 126 St., New York City, dez. kor. k. ĉ. l. k interŝanĝi PM, il. PK, fotografaĵojn, revuojn, afiŝojn, ktp.

FINNLANDO.—Lab. Esp. Klubo de Helsinki kolektadas gazetojn, afiŝojn, prospektojn, k. a. por Ekspozicio. Ĉiu, kiu sendas ricevos ŝlosilon aŭ prospekton. Adreso: K-do Lindholm, Kankurinkatu 8, Helsinki.

HISPANIO.—K-do Miguel Tarragó sciigas, al siaj eksterlandaj korespondantoj, ke lia nova adreso estas: Transmisiones D. C., Castellón de la Plana (Grao), Hispanio, k li petas skribi al li por daŭrigi la malnovan korespondadon.

HISPANIO.—K-do J. Mase, Estación, 5, Peraleda (Gerona) der. kor. kun ĉ. l. pri ĉ. t. k interŝanĝi P. M. Certa respondo!

HISPANIO.—K-do Ernesto Guillem, nia eksadministranto, kiu troviĝas nun en la fronto, dez. kor. kun ĉeĥaj junulinoj k kun ĉiuj antaŭaj amikoj. Lia adreso: 27 Brigada. Nuevo Batallón, 1.^a Compañía. Base 1.^a, C. C. n.^o 1. Hispanio.

PRI LA BROŜURO

Laŭ formala promeso de la litografejo, en la unuaj tagoj de junio estos jam pretaj la broŝuro pri la hispana ario detruita de la internacia faŝismo. La ekspedon plenumos rekte la Oficejo de la Nacia Patronado pri Turismo. Ni supozas, ke dum la daŭro de ĉi tiu monato, ĉiu leganto ricevos sian ekzemplaron. Por kromaj mendoj oni sin turnu al ni!

ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

ĜENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono

GUSTAVE FARENC

53, Rue Brise-Pain

Poŝtekonto 15944 Orleans

ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO

nur por mono de holandanoj

PETRO van der PLANK

Van Speijkstraat, 48-1

poŝtgiro 245542

AMSTERDAM W. Nederlando

BELGIO

K-DO M. DELFORGE

33, Rue de Haigne

Postgiro 199106

CHARLEROI

ANGLIO

K-DO O. MELTON

23 Fowler Str. Nechells

BIRMINGHAM 7

SVEDIO

ARBETAR ESPERANTISTEN

Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.

Postgiro n.^o 53411

STOCKHOLM

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA

POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)

ĈU

vi jam tradukis la artikolon LA ŜAFIDETO el la numero 34? Ne neglektu fari tion por pruvi la humanecon de nia afero k la realan disvastigitecon de Esperanto.

NIA MUNICIO

Valencia esperantistaro . . .	75	ptoj.
J. G.—Bazo 6. ^a . . .	10	»
F. Z.—S. R. l.—Albacete . . .	25	»
W. E.—S. R. l.—Albacete . . .	15	»
J. C.—Bazo 1. ^a . . .	10	»
R. O.—Bazo 1. ^a . . .	15	»
A. G. F.—Tabernes de V. . .	10	»
S. M.—Bazo 1. ^a . . .	10	»
F. S. M.—81 Bda. Mta. . .	2'50	»
J. L.—Scranton, Pa. . .	100	»
R. P.—Torrelló . . .	5	»
F. F.—Bazo 6. ^a . . .	20	»
J. M. B.—Callosa de Segura . .	5	»
J. P.—Aranjuez . . .	15	»
E. H.—Bazo 3. ^a . . .	100	»
P. S.—Orihuela . . .	10	»
J. M.—Peralada . . .	10	»
E. v. S.—Schiedam . . .	0'25	gd.
G. D.—Zuffen . . .	1	»
FLE-Sekcio 5.—Rotterdam . .	1'47	»
FLE-Sekcio 1.—Amsterdam . .	0'80	»
A. S. Beets. N. H. . .	1	»
F.—Aruhem . . .	1	»
FLE-Sekcio 15 . . .	5'10	»
P. v. M.—Zaandam . . .	5	»
L. T. n. ^o 3.—Haarlem . . .	2	»
L. T. n. ^o 2.—Haarlem . . .	0'80	»
L. T. n. ^o 1.—Bewerwijk . . .	1'45	»
L. T. n. ^o 9.—Haarlem . . .	1'60	»
M. L.—Heerlerheide . . .	1'50	»
B. H. L.—Rotterdam . . .	2	»
K-do L.—Amsterdam W. . .	0'20	»
A. S.—Amsterdam . . .	0'56	»
Terorlandanino . . .	5'39	»
Anonimulo el Portugalio . .	0'75	»
M. B.—Yugoslavo . . .	0'62	»
F. de K.—Rotterdam . . .	1	»
W. v. d. M.—Leeuwarden . .	2	»
A. C. H.—Rotterdam . . .	1	»
G. J. W.—Den Haag . . .	2'50	»
K-do L.—Amsterdam . . .	0'10	»
D. S. U.—Aruhem . . .	2'50	»
FLE-Sekcio.—Zwolle . . .	6'90	»
L. T. N. D. de Gravenchoy . .	15	ffr.
Ch.—Paris 17. ^a . . .	10	»
C. P.—Vaulx en Velin . . .	10	»
G. N.—Stockholm . . .	50	»
J. V.—Praha . . .	25	»
A. F.—Herstopece Brno . . .	20	»
E.—Nimes . . .	10	»
G. E. O.—Orleans . . .	1	»
J. L.—Pony por Castelnau . .	15	»
«Ĉeĥoslovakio» . . .	21'74	»
Ch. B.—Pont en Samhe . . .	15	»
A. M.—Kuressaare . . .	40	»
L. G.—Saint André . . .	15	»
G. E. O.—Orleans . . .	6	»
G. J.—Jonkoperg . . .	75	»
Germana K do . . .	5'50	f. b.
P. C.—3. ^a Kaj 4. ^a . . .	10	»
L. L.—Souvret . . .	30	»
L.—Groupe Liège . . .	20	»
Wery.—Boitsfort . . .	50	»
C. F.—La Nouviere . . .	5	»

DANAJ AMIKOJ, ATENTU!

Nova nia peranto por Danio estas

D. L. E. A. DANA LABORISTA ESPERANTO ASOCIO

KASSEREREN, AABIHOJ

Poŝtkonto: 19906

Presejo de J. Olmos, Alicante, 53, Valencia